?eestas la kuba vicprezidento la lumfeston de la hebrea komunumo



La unua vicprezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, ?eestis en Havano la Lumo-feston a? Hanuka celebron en la Granda Sinagogo de la hebrea komunumo.
Anta? komenci la tradician judan ceremonion, Díaz-Canel renkonti?is kun Adela Dworin, prezidantino de la hebrea komunumo de Kubo, en ties sidejo; anka? kun estraranoj de la judaj komunumoj de Havano kaj Caridad Diego, estrino de la oficejo por atento al la religiaj aferoj de la centra komitato de la partio.
La kuba vicprezidento lumigis la unuan kandelon de Hanuka, festo anka? konata kiel la Miraklo de la Lumoj kaj okazas ?iujare en diversaj periodoj la? la juda kalendaro.
Dum la celebrado okazis dancoj, kantoj kaj teatraj prezentoj aludantaj al la festo, anka? oni prezentis a?dvidan materialon kiu memorigis la partoprenon de la kuba gvidanto Fidel Castro en la sama celebro en la jaro 1998 kaj de la nuna prezidento Raúl Castro en la jaro 2010.
La kuba vicprezidento ricevis hanukaon kiel donancon mane de Adela Dworin, prezidantino de la hebrea komunumo; li esprimis sian kontenton partopreni la celebron de Hanuko kaj dankis pro la ebleco ?eesti kaj sperti parton de la tradicioj de la juda popolo.
Anta? ol foriri Díaz-Canel deklaris sian estimon al la kapablo de la juda komunumo subteni kaj nutri la historion, kulturon kaj konojn de la popolo juda en nia kara patrolando; li esprimis sian fidon ke inter ?iuj

eblas kunlabori kaj kontribui al konstruo de pli bona socio; temis pri neforgesebla nokto, li aldonis.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/7347-ceestas-la-kuba-vicprezidento-la-lumfeston-de-la-hebrea-komunumo

Radio Habana Cuba